

Franz Theodor Ludorff,  
La puto de Bekumo  
*tradukita de Manfred Retzlaff*

Rigardas tiun bildon, vi  
stultuloj, sen kompreno;  
miregis vi pro tiu ĉi  
brakar-gambara ĉeno.  
Ĉi tio estas stultaĵar'  
pri la Bekuma urbanar'.

La puto de Bekumo da  
kot' estis iam plena.  
Ĉerpadis oni vane, la  
laboro estis pena.  
La inoj ekscitante sin  
l' urbestron skoldis je la fin':

“Sentaŭga estro estas vi!  
Ne helpas la kirlado  
ĉe tiu puto-malfunkci'!  
Ne eblas kuirado.  
Ĉi tiun akvon kun la kot'  
vi drinku mem, vi idiot'!”

Kaj konsternite tiu ĉi  
la urb-konsilantaron  
kunvokis al urb-konsili'  
por studi la temaron.  
Diskutis ili kun fervor'  
de l' oka ĝis la dua hor'.

“Ja eblus”, jen konsilian',  
“kun viroj pendigantaj  
sin reciproke per la man'  
ĝisfunde atingantaj.”  
“Bonega estas la ide'!”  
ekkriis ĉiuj, ĝojis tre.

Urbestro kaj konsilantar'  
ĝin faris nun tuj poste,  
kaj viroj el la urbanar'  
kunhelpis eĉ senkoste.  
Plej supre pendis Jan' Birdul',  
ĉar estis li la plejfortul'.

...

Kaj kiam nun la tuta ĉen'  
 malsupren pendis tie,  
 dolorojn Jano' sentis en  
 la brakoj, vokis krie:  
 "Ho, kara Manjo, kuru vi!  
 Bezonas nepre brandon mi!"

"Vin tenu firme!" vokis li,  
 dum estis ŝi survoje,  
 al la aliaj, "devas mi  
 enmanen sputi foje."  
 Li faris ĝin, ne tenis plu,  
 kaj ĉiuj kuŝis en la tru'.

*Traduko de la Basgermana poemo "De Biäkemer Raothues-Pütt" de FRANZ THEODOR LUDORFF (\*1801) en Esperanton de MANFRED RETZLAFF (\*1938-11-04) en 2002-05-05.*

MR-334-3 / Arg-476-920 (2008-08-03 23:59:01)

*Tradukita en la Internacian Lingvon de Manfredo Ratislavo (Manfred Retzlaff) en Novembro/Decembro 2000, laŭ la origina vestfalia-platgermana teksto, kiun en la jaro 1834 verkis la Monastera justic.-komisaro FRANZ THEODOR LUDORFF (\* 1801) por mistifiki la Bekumanojn. La Monasteraj popol-kantistoj FLÖR (BERNHARD FRIEDRICH WALLBAUM, † 1840) kaj KÖSTERS (el la urbo Münster/Westfalen) diskonigis ĝin en 1838/39 sur la Monastera jar-foiro 'Send' per kantfolio. Oni kantis la morkanton laŭ melodio de HANS DRENKEPOHL kaj OSSENBIECK. (Tiuĵ verŝajne estas la kaŝnomoj de la kantistoj Flör kaj Kösters, kiuj disvastigis la tekston de la kanto sur propraj flugfolioj.) Laŭ unua strofo rilatas al bildigo, kiu aperis en la Bekuma karnavala flugfolio "Der Faschingsbote von Freudenthal an der Aa" (= "La karnavala mesaĝisto"), aperinta en al jaro 1834. En postaj publikigoj tiu unua strofo estas forlasita.*